

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. —Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administreto: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

ESPERANTO EN LERNEJOJ.

La ĉefa celo de la esperantista penado estas la enkonduko de Esperanto en lernejojn, ĉar estas evidente, ke sole la lernejo, tiu vera lulilo de scio kaj de la progreso, povas helpi al la tutmonda, ĝenerala uzado de la lingvo internacia.

gantojn speciale ĝojigos la fakto, ke ankaŭ la ĉs. ministerio de instruado permesos en la venonta lerneja jaro la fakultativan instruadon de Esp. en la mezaj lernejoj de la ĉs. respubliko. Tion pravas la jena cirkulero, kiun la Landa lerneja konsilantaro ĵus dis-

PRAHA.
PANORAMO DE
ORIENTO DE
IAMA REĜA
KASTELO
HRADČANY,
NUNE SIDEJO
DE KELKAJ
MINISTERIOJ.



MALDEKSTRE
LA
„BLANKA TURO“,
EN
MEZEPOKO
UNUA-
RANGA ŜTATA
MAL-
LIBEREJO.

Kaj tiu ĉi penado, danke al la obstineco de niaj pioniroj, en la lasta jaro alportis al nia movado rezultatojn tre ĝojigajn. Post gratulindaj sukcesoj de niaj anglaj samideanoj venis la raporto de la Komerca ĉambro de Parizo, kiu decidis enkonduki instruadon de Esp. en la komercajn lernejojn de sia distrikto, nelonge poste informis nin la esperantistoj de la nova libera ŝtato Danzig pri siaj tiurilataj sukcesoj, kaj preskaŭ samtempe oni anoncis la decidon de la »Fako por publika instruado« de la kantono ĝeneva (Genève, Svisio), kiu decidis la devigan instruadon de Esp. en la lasta klaso de la unuagrada lernejoj. Ankaŭ en Hamburg, en popollernejo Kaetnerkamp estas depost la Pasko Esp. instruata devige en tri klasoj.

Ni ne dubas, ke niajn ĉeĥoslovakiajn le-

sendis al ĉiuj direktoj de la mezaj lernejoj en la respubliko:

Zemská školní rada v Praze.

Čís. I-B 718-31171 ai 1921 ze 14. IV. 21.
Ministerstvo školství a národní osvěty dalo sem výnosem ze dne 27. března 1921 č. 5545-21 věděti, že jest ochotno ve školním roce 1921-22 tam, kde pro vyučování esperanta budou příznivé podmínky osobní i věcné, povolovati vyučování tomuto předmětu jako předmětu nepovinnému na státních středních školách.

Ředitelství se ukládá, aby do konce školního roku 1920-21 pro případ, přihlásí-li se příslušný počet účastníků pro příští školní rok, podalo sem návrh na zavedení tohoto předmětu a učebnou osnovu a aby oznámilo, jakým způsobem navržený učitel nabytí způsobilosti pro toto vyučování.

Místopředseda zemské školní rady:
Dr. Metelka v. r.

(Traduko.)

Landa lerneja konsilantaro en Praha.

No. I-B 718-31171 ai 14. IV. 1921.

La ministerio de instruado kaj nacia klero sciigis nin per dekreto el 27. marto 1921 n-ro 5545-21, ke ĝi volonte en la lernejjaro 1921-22 tie, kie por instruado de esperanto estos taŭgaj kondiĉoj personaj kaj aferaj, permesados instruadon de tiu ĉi fako kiel fakultativa (nedevisa) en ŝtataj duagrada lernejoj.

Al la direkto de lernejo oni ordonas, ke ĝis fino de la lernejjaro 1920-21 en okazo, ke anonciĝos laŭleĝa nombro de partoprenantoj por la venonta lernejjaro, ĝi sendu al ni proponon enkonduki tiun ĉi fakon kune kun instruplano kaj ke ĝi sciigu, kiamaniere la proponita instruado akiris kapablecon por tiu ĉi instruado.

Vicprezidanto de la landa lerneja konsilantaro: Dr. Metelka m. p.

La decido de la ministerio niaflanke ni lasas sen komentario. Al nia instruistaro kaj profesorado ni nur varme rekomendas zorgite tralegi kaj trastudi la admonojn kaj inspiron de nia eminenta samideano Dro. Kamaryt, kiujn ni enpresas en tiu ĉi kajero kaj ĉefe — agi.

B. T.

La evoluo de la ĉeĥa muziko.

(Dediĉita al sinjoro Martti Hella en Raŭmo, Finnlando.)

Jam en frua tempo Ĉeĥio estis lando, kie la muziko estis fervore favorata kaj oni povas diri, ke la muzikemo estas en animo de ĉiu ĉeĥa naciiano. La ĉeĥaj muzikistoj havis ĉiam gloran reputacion en la tuta mondo.

En la mezepoko la ĉeĥa muziko estis precipe eklezia. En la dua duono de la dekoka jarcento komenciĝas la plej fama periodo, kiu daŭras ĝis nun. Oni povas dividi ĝin je tri partoj: 1. Malnova (antaŭ Smetana). 2. Periodo de la grandaj komponistoj Smetana, Dvořák kaj Fibich. 3. Moderna periodo.

1. La verkistoj staras sub influo de fremda muziko, precipe la germana, sed oni komencas rekoni la valoron de naciaj motivoj kaj uzi ilin en artaj verkoj.

Jiří Antonín B e n d a († 1795) estas nomata kiel kreinto de la melodramo kaj estas glora pro siaj interesaj reformoj, kiuj antaŭiris la reformojn wagneriajn en la dramata muziko.

En Romo estis glorata Josef M y s l i v e - ĉ e k († 1781), kiun la Italoj nomis »il divino Boemo«. Václav Jan T o m á š e k († 1850) fama instruisto de pianludo skribis verkojn por piano. František Š k r o u p († 1860) kies kanto el lia opero »La dratumisto« estis akceptita kiel nacia himno ĉeĥa. Pavel K ř í ž - k o v s k ý († 1885) antaŭulo de Smetana, verkis bonegajn fiorkantojn kun naciaj motivoj.

2. En la dua periodo tri aŭtoroj levigas la ĉeĥan muzikon ĝis la plej alta grado kaj fiksigas ĝian gloron en la tuta mondo.

Bedřich S m e t a n a (1824—1884) Liaj operoj reproduktas la naturon kaj karakterizan serĉon de la ĉeĥa nacio en maniero plej arta kaj markas novan epokon. Malgraŭ influo de la naciaj kantoj, kiuj estis ĵus kolektitaj, kaj spite influo de la orkestraj novaĵoj de Liszt kaj Wagner, la programo de Smetana estas tute nacia kaj moderna.

La nacia kaj liberala elemento sekve de la popola movado de la jaroj 1848 kaj 1860 klopodis por obteni ĉie la konstitucian liberecon, kie li povus pruvi sian kapablecon. Je muzika vidpunkto la reprezentanto de tiu movado estas Smetana.

Li komencis sian karieron kiel pianisto kaj komponisto. Lia majstro Liszt ekkonis lian genion kaj helpis lin. En 1856 li estis nomita kapelestro de la filharmonio en Göteborg (Svedio). Reveninte li estis kapelestro de la provizora teatro en Praha post la brila sukceso de sia komika opero »La vendita fianĉino«, en kiu la poeto efektivigis sian modernan idealon per la freŝeco de dialogoj feliĉe elprenitaj el vivo de la ĉeĥa nacio. En la jaro 1872 li verkis la operon »Libuše«, pri la legenda profetino de la glora estonteco de Praha. Tiu ĉi opero estas apoteozo de la ĉeĥa nacio kaj verko de granda originaleco, kie oni la unuan fojon sentas la fortajn simfoniajn notojn de pli malfruaj tempoj.

Grandaj estis liaj gloro kaj sukceso, sed ne malpli grandaj estis la opozicio kaj batalo kontraŭ liaj novaĵoj. Kion ne atingis liaj malamikoj, tion faris la naturo. La majstro surdiĝis en 1874 kaj devis forlasi la direktadon de la Nacia teatro. Pro tio tamen ne finiĝis lia aktiveco komponista. Li fordonis sin al komponado de simfonioj kaj en tiu ĉi fako de f'abstrakta muziko, libera de ĉia influo de la teatra publiko li skribas »Mian patrujon«, orilegan komponaĵon modernan. Li skribis ankaŭ multajn aliajn simfoniojn revivigante muzike la legendon kaj historion de ĉeĥa nacio. Cerba malsano malhelpis lin labori en la lastaj jaroj, li komponis havante halucinaciojn kaj fine mortis en frenezulejo.

Apud Smetana brilas la nomo de Antonín D v o ř á k (1841—1904). Li studis en Praha kaj eminentiĝis per sia muzika talento kiel komponisto de »Slavaj dancoj«, kiuj trovis entuziasman favoron precipe en Germanio kaj Anglio. Dum Smetana sekvis la grandajn reformatorojn Berlioz kaj Wagner, Dvořák

laboris en alia direkto reprezentata per Beethoven kaj Brahms. La signifo de Dvořák bazas sur lia muziko simfonia kaj kamera. La plej perfekta el liaj simfonioj »El nova mondo« estas esprimo de liaj impresoj el artista Ameriko, kaj enhavas indianajn motivojn. — Malgraŭ sia sukceso en muziko instrumenta li havis ambicion akiri ankaŭ la scenejon. El liaj operoj la plej bela estas »Rusalka«, kie lia lirika talento brile montriĝas. Krom tio li skribis multajn koncertojn por piano, violono kaj violonĉelo, kantojn, naciajn legendojn, slavajn rapsodiojn kaj aliajn.

Zdeněk Fibich (1850—1900) posedis jam en dudek paroj la plenan teknikon de la muzikanto. Pro sia romantika talento li estis ofte nomata »ĉefa Schumann«. Krom operoj el ĉefa kaj Slava vivo, el kiuj oni ŝatas precipe la melodraman trilogion »Hipodamio« li verkis ankaŭ simfoniojn kaj melodie belajn komponaĵojn por piano. Li oferis sian popula-recon al pura arto.

3. La duan kaj trian periodon kunligas du aŭtoroj: Karel B e n d l († 1897), fruktodona dirikisto kaj Josef N e š v e r a († 1914) eklezia komponisto.

Plej eminentaj ĉefaj modernaj komponistoj estas la lernantoj de Dvořák Josef S u k (* 1874) kaj Vítězslav N o v á k (* 1870). Ambaŭ kuraĝe eniris novajn vojojn kaj iliaj kreaĵoj apartenas al plej eminentaj kaj belaj verkoj de la nuntempa muziko. Ambaŭ estas komponistoj de la instrumenta kaj kamera muziko, de komponaĵoj por piano kaj Novák skribis ankaŭ ciklojn de belegaj kantoj uzante tipajn slovakajn motivojn.

En fako de kanto laboras ankaŭ kun sukceso Jindřich J i n d ř i c h. Leoš J a n á ĉ e k (*1854) enkondukas la muzikan deklamacion.

Al partianoj de Smetana apartenas Josef B. F o e r s t e r (* 1859) eminenta komponisto instrumenta kaj Karel K o v a ř o v i c († 1920), Otakar O s t r ĉ i l kaj Oskar N e d b a l (* 1874) kiuj pliriĉigis literaturon per operoj.

Koncerne la produktivan muzikon multaj kaj gloraj estas ne nur majstroj (kiel violonisto Otakar Š e v ĉ í k ĝuas tutmondan gloron, liaj lernantoj posedas eksterordinaran teknikon) sed ankaŭ la artistoj. Je violono Jan K u b e l í k, Jaroslav K o c i á n, František O n d ř í ĉ e k kaj Karel H o f f m a n n. En kanto Emma D e s t i n n o v á kaj Karel B u r i a n.

Ni menciuj ankoraŭ la »Ĉehan kvarteton«, kiu atingis la supron de la muzika perfekteco

kaj estas la plej glora societo ĉefa krom la »Ĉefa Filharmonio« kaj la »Nacia teatro« en Praha.

(Laŭ artikolo de Dro. N. d'Alfonso tradukis Rudolf Fridrich.)

oooo

Instruistoj de esperantoj

La ministerio de instruado kaj nacia klerigo nomis, kiel konate, ĉe »Ekzamenaj komisionoj por civitanaj lernejoj« en Praha kaj Brno ekzamenistojn pri esperanto kaj en estonto permesados instruadon de esperanto en publikaj lernejoj sole al personoj, kiuj estis ekzamenitaj ĉe la nomitaj komisionoj. Ni rekomendas tial tre insiste, ke ĉiuj sentantaj sin kapablaj instrui esperanton en publikaj lernejoj, postulu esti ekzamenataj. Ricevi ateston povas ne nur ĉiuj instruistoj de publikaj lernejoj, sed ankaŭ neinstruistoj. Tiu ĉi devas krom la ekzameno pri esperanto absolvi specialan ekzamenon pri ĝenerala klero, sed sole en tiu okazo, se ili ne povas pruvi ĝin per ia skriba dokumento ekz. per Atesto pri matureca ekzameno, absolutorio de komerca lernejo ktp. La aliĝojn sendas instruistoj kaj oni adresas ilin al »Zkušební komise pro občanské školy« en Praha aŭ Brno laŭ loĝejo de la kandidatoj. (La donita adreso sufiĉas.) La ekzamenotaj de la ekzamena komisaro estas la samaj kiel ĉe la »Ekzameno pri kapableco instrui esperanton en lernejoj kaj kursoj« de la Ekzamena komisiono de Ĉ. Asocio Esp. Tial ni rekomendas speciale al la esperantistoj ricevintaj la diritan diplomon havigi al si ankaŭ aprobon de la publikjura kvalito. Por instruado de esperanto en civitanaj lernejoj pagas la registaro al la instruantoj laŭ la nombro de la semajnaj horoj konforme al la leĝaj aranĝoj pri salajroj por instruado pri la laŭvolaj fakoj.

Dro Stan. K a m a r y t,
prezidanto de la Ekzamena komisiono
de Ĉ. A. E.

oooo

ESPERANTISMO

XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

31. VII. — 6. VIII. 1921 en Praha.

IX. Komuniko.

Sinjorino Clara Zamenhof estis invitita de la Loka Kongresa Komitato kiel honora gasto de la XIIIa. Dro L. Zamenhof, frato de la majstro, aliĝis al la XIIIa.

Honora protektanto de la Kongreso fariĝis ĉeĥoslovaka registaro per sia decido de la 23. III. 1921.

Subkongreso de Sennaciuloj, aranĝata de Liberiga Stelo sub la honora prezideco de Henri Barbusse. Informoj ĉe »Liberiga Stelo, Paris XX., rue Boyer 23.«

Fakaj kunvenoj. Adresoj de la organizantoj: arkitektoj: So. Générmont, Moulins II., placo de la République, ĉastemuloj: So. Roskes, Hago, v. Loostr. 68, fervojistoj: Fino Dlouhá, Praha, Wilsonovo n., filatelistoj: So.



PRAHA. BLANKA TURO, LA MEZEPOKA
MALLIBEREJO

Fleischer, Praha IV., Na vatech 278, iramasoj: So. Faulhaber, Amsterdam, Berger str. 103, hebreaĵnaciaoj: So. Heller, Litoměřice, Ĉeĥoslovakujo, intruistoj: Fino. Šupichová, Praha, Malá Štěpánská 6, ĵurnalistoj (verkistoj): So. Weiner, Praha, »Tribuna«, katolikoj: So. Zelenka, Praha-Liboc 113, komercistoj: So. Dro. Unger, Zürich 6104, kristanoj: So. Tutsch, Praha II., YMCA, kuracistoj: MUDr. Bischitzky, Praha I., Mikulášská 12, liberpensuloj: So. Hromada, Praha VII., Sochařská 333, anoj de malgr. nacioj: Prof. Fridrich, Brno, Královo Pole, oficistoj: So. Oberrotmann, Warszawa, Krak. Przedm. 10, pacifistoj: Fino. Moudrá, Praha II., Malá Štěpánská 6, poŝtovicistoj: Fino. Hemerová, Praha-Karlín, Vítkova 2, psikistoj (spiritualistoj) So. Skleněčka, Hradec Král., Živnobanka, ruĝa kruco So. Kraus, Praha I., Ul. Karoliny Světlé 21, sciencistoj: Dro. Kamaryt, Bratislava, Tělocvičná 3, skoltoj: So. Pitlík, Praha III., Nerudova 40, socialistoj: So. Šidlo, Praha VII., Ovenceká 376, studentoj: So. Lukáš, Praha II., Jenšteinská I, ŝakludantoj: So. Hájek, Praha-Nusle 396, teosofanoj: So. Čimr, Praha II., Krakovská 17, vegetaranoj: So. Tutsch, Praha, YMCA, virinoj: Fino. Nesměráková, Praha-Vršovice, Baráková 174. La interesuloj pri la fakaj kunvenoj sin turnu rekte al la organizantoj!

Kotizo. Vidu la VII. komunikon! La kotizajoj, sendotaj post la 1. junio altiĝas je 50 %. Krom la jam en la VII. kaj VIII. komunikoj menciitaj pagis la sekvantaj numeroj: 1—4, 6, 7, 9, 32, 35, 48, 49, 57—59, 66, 81, 83, 84, 88, 102, 104, 109, 124, 153, 157, 170, 184, 185, 206—212, 255, 310, 311, 337—340, 346, 349—363, 366—381, 406—426, 428—456, 458—464, 466—474, 481—483, 486—498, 500—507, 510, 511, 513—516, 518—532, 537, 541—543, 556—572, 576—585, 587—602, 604, 607—688, 701—706, 708—716, 720—737. La pagintoj ricevos post la 1. junio la kongreskartojn, por uzi ilin ĉe la ĉeĥoslovakaj eksterlandaj kaj enlandaj oficoj.

Aliĝoj. La nomo de la urbo ĉe la kune aliĝintoj troviĝas ĉiam ĉe la lasta! 381. So. Pařízek — Užok (anstataŭ So. Sappl — 128!), 406. Sino. Oulehlová — Skřivany, 407. So. Hes, 408. So. Interholzinger — Plzeň, 409 So. Dolanský — řany, 410. So. Tichota — Dolany, 411. So. Bouček, 412. So. Jar. Demut, 413. So. Jos. Demut, 414. So. Hovorka, 415. So. Bláha, 416. Fino. Würflová, 417. Fino. Hladká, 418. Fino. Honzová — Plzeň, 419. So. Zika — Klabava, 420. kaj 421. Gesoj Černý, 422. Fino. Holubová, 423. Fino. Melková — Plzeň, 424. So. Svetolík — Pírov, 425. kaj 426. Gesoj Šembera — Brno, 427. So. Kaplan — Bialystok, 428. So. Koc, 429. Fino. Tyšerová — Plzeň, 430. So. Heinze — Oberlössnitz, 431. So. Löffler — Radebeul, 432. So. Schlag — Kötzchenbroda, 433. So. Barthelmus — Düsseldorf, 434. So. Radó — Lučeneč, 435. So. Hönigsberger — Nürnberg, 436. So. Gili — Sarria, 437. Dro. L. Zamenhof — Warszawa, 438. So. Švingr, 439. So. Vyhnal — Cehnice, 440. Fino. Hájková — H. Bříza, 441. So. Eiselt — Vinohrady, 442. So. Riedl — Nová Paka, 443. Fino. Tomková — Jilemnice, 444. So. Červený — Starkoč, 445. Sino. Raichlová — Dobré, 446. Fino. Lieblová — Plzeň, 447. So. Kratochvíla — Seredí, 448. So. Knopf — Beuthen, 449. So. Bredall — Croydon, 450. So. Dufrenne, 451. kaj 452. Gesoj Donker — Amsterdam, 453. So. Gaševski, 454. So. Fandekov — Sofia, 455. So. Stojan Terzew — Grančar, 456. So. Schmidt — Nové Zámky, 457. So. Kozirev — Moskva, 458. So. Forejt, 459. Fino M. Lajblová, 460. Fino. R. Laiblová — Doubravka, 461. So. Glöckner — Freiberg, 462. Fino. Sloun — S. Francisco. 463. So. Kurjanski — Bialystok, 464. So. Hronek — Slaný, 465. So. Sperling — Niedersiedlitz, 466. So. C. Mahn, 467. So. A. Mahn, 468. So. Pohl, 469. So. Schwaiger — Berlin, 470. So. Küssner — Delitzsch, 471. S. Walther — Magdeburg, 472. So. Mawbey — Johannesburg, 473. Fino. Macfarlane-Partik — Glasgow, 474. So. Wüster — Berlin, 475. So. Cunia, 476. So. Zajíc — Přívoz, 477. Fino. Holec, 478. So. Benisch — M. Ostrava, 479. Sino. Baroch — S. Ostrava,




PRAHA. MEZEPOKA STRATO (PROKSIME DE
LA KASTELO). LA DOMETOJ ESTIS
LOĜATAJ DE ALĤIMISTOJ

480. So. Janík — Vítkovice, 481. So. David — Liberec, 482. kaj 483. Gesoj Stratil — Bratislava, 484. So. Braschke — Breslau, 485. So. Phee — Glasgow, 486. Fino. Schmulders — Vught, 487. kaj 488. Gesoj Brantjes — Hertogenbosch, 489. So. Santamaria, 490. kaj 491. Gesoj Acha — Bilbao, 492. So. Solta — Bernice, 493. So. Dubný — Orlová, 494. So. Veselý — Vichová, 495. So. Papica — Mezice, 496. So. Urban — Litovel, 497. So. Koláček, 498. So. Malý, Jilemnice, 499. So. Pfenningwerth — Horschfelde, 500. Fino. Šupichová, 501. Fino. Moudrá, 502. Fino. Dlouhá,

So. Rippel — Würzburg, 533. So. Madel, 534. So. Bartel, 535. Fino. Tumpach, 536. So. Waltner — Graz, 537. So. Wenig — Měcholupy, 538. So. Mergel — Warszawa, 539. So. Pech, 540. So. Kleich — Zittau, 541. kaj 542. Gesoj Kratochvíl — Smíchov, 543. Fino. Příhoda — Dvůr K., 544. So. Bock, 545. Fino. Bock, 546. So. Mezník, 548. kaj 549. Gesoj Huppert, 550. kaj 551. Gesoj Frankel, 552. So. Synek, 553. So. Bienenstoch, 554. So. Teichmann, 555. So. Gogolka — Bielitz, 556. Sino. Janečková — Vítkovice, 557. Fino. Becker, 558. Fino. Krefft — Breslau, 559. So.

PRAHA.
LA ĈEFURBO
DE
ĈEĤOSLOVAKIO
PREZENTIĜAS
KIEL MUZEO
DE
ARKITEKTURO.
PRESKAŬ
ĈIUPAŜE



ONI TROVAS
ADMIRINDAJN
VERKOJN
DE MEZEPOKA
KONSTRUARTO.
JEN
LA PALACO
DE LA NUNA
TEKNOLOGIA
MUZEO.

503. So. Dejmek, 504—506. Familio Novák, 507. Dro. Kohout — Praha, 508. So. Bernhard — München, 509. So. Boschan — Praha, 510. Fino. Lonštáková, 511. Fino. Dočkalová — Prostějov, 512. So. Rippl — Hards, 513. Fino. Jiroutová — Moravany, 514. So. Drechsler — Dresden, 515. So. Steche — Leipzig, 516. So. Rösch — Radebeul, 517. So. Schamanek — Wien, 518. Fino. Koekebakker, 519. Fino. Groenendijk — Amsterdam, 520. So. Halbedl — Graz, 521. Fino. Boström, 522. So. Skog — Gävle, 523. So. Brablec, 524. Fino. Brablecová — Kuštát, 525. kaj 526. Gesoj Ravenstein — Hago, 527. So. Despeyroux — S. Genis Laval, 528. Fino. Valario — Barcelona, 529. Sino. Umánský — Genève, 530. So. Yppen — Düsseldorf, 531. So. Pilc — Czenstochowa, 532.

Mangada — Jaca, 560. Sino. Čermáková — Ústí n. Orli., 562. kaj 563. Gesoj Štřelec — Biškovice, 564. Fino. Klusalová — Frýšták, 565. Fino. Fojtová — Bystřice p. H., 566—569. Familio Kubásek — Plzeň, 570. Dro. Drtina — Beroun, 571. So. Kroutl — Č. Budějovice, 572. So. Tokař — Vítkovice, 573. kaj 574. Gesoj Privat — Genève, 575. So. Carles — Beziers, 576. So. Prats — Tarrasa, 577. Fino. Wagemaher — Rotterdam, 578. So. Hába — Vizovice, 579. kaj 580. Gesoj Balák — Husovicé, 581. So. Grohmann — Georgswalde, 582. So. Kirchhübel — Ebersbach, Gesoj Aron — Königsberg, 586. Dro. Blassberg — Krakow, 587. kaj 588. Gesoj Mráz — Trenčín, 589. kaj 590. Finoj M. E. Kopecká, 591. So. Strnad, 592. So. Tuček, 593. Fino. Vlčková, 594.

So. Vosecký, 595. Fino. Weigelová, 596. So. Dobeš, 597. kaj 598. Gesoj Janda, 599. So. Fábbera, 600. kaj 601. Gesoj Hromada — Praha, 602. So. Schumm — Schweinfurt, 603. So. Jungfr — Lübben, 604. So. Alings — Amersfort, 605. Fino. Kennedy, 606. So. Kennedy — Glasgow, 607. Fino. Hrbáčková — Zlín, 608. Dro. Dietterle — Leipzig, 609. So. Panler, 610. Sino. Markus, 611. So. Zevach, 612. kaj 613. Gesoj Steinhauer, 614. So. Sinek, 615. Sino. Malá, 616. So. Zoubek, 617. So. Deistler, 618. So. Seidl, 619. So. Schicketanz, 620. Fino. Schicketanz, 621. kaj 622. Gesoj Krieger, 626. So. Bischof, 624. So. Berman, 625. So. Jokl, 626. kaj 627. Gesoj Sussmann — Wien, 628. kaj 629. Finoj B. R. Schwarccová — Smíchov, 630. Fino. Lukešová — Bubenec, 631. So. Kok — Rotterdam, 632. So. Hartman, 633. So. Langer, 634. So. Stankiewicz — Warszawa, 635. So. Clavenna, 636. So. Redolfi, 637. Fino. Tegoni, 638. kaj 639. Sino. kaj Fino. Imperiale — Sampierdarena, 640. So. Jiresch — Neu-Sednitz, 641. So. Pöcke, 642. So. Lehnert, 643. So. Lorenz, 644. So. Walter, 646. So. Seidl, 647. So. Müller, 648. So. Storch, 650. Fino. Lustinetz, 651. Fino. Fiedler, 652. Fino. Ahne — Krochwitz, 653. So. Vosáhllo, 654. So. Ludvík, 655. Fino. Mersičová, 656. Sino. Pemlová — Přelouč, 657. So. Mašek — Stupno, 658. Fino. Marelová — Slavoňov, 659. So. Matouš — Č. Budějovice, 660. So. Aišman — Plzeň, 661. Fino. Veselá — Josef, 662. So. Kolm — Plzeň, 663. So. Paša, 664. Fino. Mičková — Hrušov, 665. So. Bohutínský, 666. Fino. Mráčková, 667. Fino. Plzeňská, 668. Fino. Heppnerová, 669. So. Vondruška, 670. So. Šilha, 671. Fino. Kubíková, 672. Fino. Vojtová, 673. Fino. Storchová, 674. Sino. Kostínková, 675. Fino. Fialová, 676. Fino. Vycpálková, 677. Fino. Hlaváčová, 678. Fino. Nesměráková, 679. So. Vraný, 680. Fino. Bálková, 681. Sino. Panýrová — Praha, 682. kaj 683. Finoj B. S. Chroustová — Tuklaty, 684. Fino. Součková — Praha, 685. So. Podloučka, 686. Fino. Hübner — Brno, 687. Dro. Fischer — Weidenau, 688. Fino. Hlaváčková Kladruby, 689. kaj 690. Gesoj Rozanykwiat, 691. Sino. Fidelseid — Warszawa, 692. Dro. Samu, 693. kaj 694. Gesoj Herz — Budapest, 695. kaj 696. Gesoj Turzo — Szeged, 697. So. Roboz — Budapest, 698. So. Sørensen — Skjelskór, 699. So. Hlouň — Ném. Brod, 700. Fino. Alschwang — Lausanne, 701. So. Cros — Perpignan, 702. So. Guenoff, 703. So. Kolev — Sofia, 704. Fino. Marcus — Lodz, 705. So. Grada, 706. Delegito laborista — Genova, 707. So. Guéritte — Surbiton, 708. kaj 709. Gesoj Krejl, 710. Fino. Jørgensen, 711. So. Alsing, 712. Fino. Rybo, 713. Fino. Asmussen, 714. So. Taumose — Kobenhavn, 715. kaj 716. Gesoj Medem — Kovno, 717. So. Havrda — Dobřichovice, 718. So. Sklenčka — filo — Hradec K., 719. So. Michalek — Liberec, 720. kaj 721. Sino.+filo. Fadinkov — Sofia, 722. Fino. Metz, 723. So. Halasz — Targu Mures, 724. So. Cesarini, 725. Fino. Cesarini — Potenza, 726. So. Simeonov. — Sofia, 727. So. Hebký, 728. kaj 729. Gesoj Poustka, 730. So. Wisinger, 731. So. Šuster, 732. Fino. Hodíková, 733. So. Cavallar, 734. So. Waldstein, 735. Fino. Waldsteinová, 736. kaj 737. Gesoj Ivánovič-Švarz — Praha. **Post la 20. de majo estos al ĉiuj aliĝintoj esper. Asocioj kaj al ĉiu kiu ilin dezirus, sendotaj oficialaj aliĝiloj!**

Loĝado. Vidu la VII. komunikon! Oni loĝigos la kongresanojn en hoteloj kaj privataj loĝejoj. **Loĝado en komunaj loĝoj (lernejoj) pro teknikaj kaŭzoj estas neefektivebla.** — Studentoj turnu vin al So. Weiner, redaktoro de »Tribuna« en Praha! — Al personoj, kiuj aliĝus post la 15. de julio aŭ alvenus ne aliĝinte oni ne garantias la loĝigadon. Loka Kongresa Komitato ne povas garantii al ĉiu la loĝigon en privata familio. La pli frue aliĝintojn oni preferos. Konatuloj uzu ankaŭ la duan pli markaran provizoran liton en la sama ĉambro!

Donacoj. So. Němec 10 Kč, So. Becker 20 m. p., lernantoj de Fino. Minaříková 30 K, So. Aron 18 m, So. Cesarini 10 l, Sino. Ivanovič 10 K, So. Kroutl 15 K.

Garantia fundo. 18. So. Hönigsberger 100 K, 19. So. Goemans 200 K, 20. So. Aron 100 K, 21. So. Isbrücker 200 K, 22. So. Stratil, 23. So. Dubný, 24. So. Degenkamp, 25. So. Elizondo po 100 K, 26. So. Clavenna 300 K. Garantiiu almenaŭ 100 Kč.

Deponita mono. So. Hönigsberger 96.56 K, So. Goemans 200 K, So. Elizondo 100 K, So. Gros 25 fr. fr., Fino. Rybo 8 d. K.

Ĉeĥoslovakaj ambasandorejoj kaj konsul., kiuj devas vizi la pasportojn (vidu la VIII. komunikon!), troviĝas en sekvantaj urboj: Berlin, Hamburg, Dresden, Köln, Chemnitz, Bremen, Breslau, München, Dortmund, Nürnberg, Leipzig, Frankfurt, Wien, Graz, Linz, Bruxelles, Sofia, København, Madrid, Paris, Lyon, London, Oppeln, Gravenhage, Roma, Trieste, Milano, Genova, Budapest, Warszawa, Krakow, Bukarest, Galatz, Stockholm, Bern, Zürich, Constantinople, Beograd, Lubjana, Zagreb, Sarajevo, Split, Buenos Aires, Sidney, Rio de Janeiro, Montreal, Alexandria, Washington, Chicago, Pittsburgh, San Francisco, Saint Louis, Bombay, Tokio, Batoum, Vladivostok. — Ĉs. ministerio por eksterlandaj aferoj per sia decido de la 2. aprilo 1921, No. 617-4-21 zprav. ordonis ĉiujn ĉs. eksterlandajn oficojn helpi ĉiuokaze la kongresantojn. — Oni petis rabaton je pasportvizoj. Decido de ministerio por eksterlandaj aferoj aperos en la X. komuniko. **Vojaĝrabato.** La Loka Kongresa Komitato petis rabaton por la vojaĝo sur la ĉeĥoslovakaj fervojoj. La decido de la fervojministerio aperos en la X. komuniko, kiu alportos ankaŭ aliajn gravajn informojn.

Adreso. Aug. Pitlík, Praha III., Nerudova 40. (Oni respondos nur, se estis aldonitaj respondokupono aŭ afranko en neuzitaj naciaj poŝtmarkoj!).

Por la Loka Kongresa Komitato:

Augustin Pitlík,
ĝenerala sekretario.

Esperantistoj de Ĉeĥoslovakio!

Vi helpos la loĝigon de eksterlandaj gastoj, se Vi penos prizorgi Vian dumkongresan loĝadon ĉe Viaj parencoj en Praha, aŭ ĉe la parencoj de Viaj konatuloj. Aug. Pitlík.

Alvoko al kuracistoj!

. Kolegoj! Venu grandnombre al la Dektria kaj partoprenu nian kuracistan kunvenon!

Jen nia programo laŭ ĝis nun anoncitaj raportoj!

1. Dro W. Robin el Varsova: »Pri revivigo de T. E. K. A.«

2. Dro. K. Mezei el Budapeŝto: »Internacia medicina revuo.«

3. Prof. Richet el Parizo: »Medicina terminologio.«

4. Dro Blasberg el Krakovo: »Transformiĝado de ideoj kaj direktoj en la moderna kliniko.«

5. Dro. K. Weiss el Stuttgart: »La kuracista organizado kaj la kontraŭmalsana asekuro en Germanujo.«

Programo ankaŭ povas esti ŝanĝota aŭ pliiĝota!

Postkongresa ekskurso al la famekonataj nordbohemiaj banlokoj Franzensbad, Marienbad, Karlsbad kaj Joachimsthal.

Aliĝu kiel eble plej baldaŭ kaj anoncu vian aliĝon ankaŭ al mi private per poŝtkarto.

MUDr. Adolf Bis ch i t z k y,
Praha, Mikulášská 12.

Universala Framasona Ligo.

(Esperantista.)

La jarkunveno de suprenomita ligo okazos la 2an de Aŭg. 1921 en Praha dum la XIIIa Universala kongreso de Esperanto. Tiu ĉi kunveno havos grandan signifon por propagando de Esperanto inter la framasonoj ĉiulandaj. Ĉiu framasono, vizitonta la kongreson estas invitata viziti la kunvenon. Tagordo: 1. Malfermo. Protokolo. 2. Raportoj: sekretario-kasisto. 3. Propagandaj dimedoj. 4. Aliĝoj al »Fédération Maçonnique.«

Diskonigu ĉi tiun alvokon en la framasona gazetaro de via lando! La estraro.

»Universala Ko-Framasonio«

(ordre Maçonnique Mixte Internationale) »Le Droit Humain«)

Kelkaj membroj aranĝas publikan kunvenon dum la XIIIa kongreso de Esperanto en Praha.

Temoj: 1. Kio estas Framasonio? 2. La virino en la Framasonio. 3. La Ordeno de Universala Ko-Framasonio.

Interesuloj estas invitataj viziti ĉi tiun kunvenon. La paroladoj estos tute en Esperanto. Samspeca kunveno okazos en Frankfurt a. M. la 29an de Julio. Paroladoj tute en Esperanto kun germalingva traduko.

Broŝuro: »Kio estas Universala Ko-Framasonio« baldaŭ aferos kaj estos disdonata al la vizitantoj de ĉi supraj kunvenoj.

La aranĝantoj.

ALIĜU AL Ĉ. A. E.!!

DIVERSAĴOJ

Atentigo! Kaiŝe de troa abundeco de diversaj raportoj kaj sciigoj pri XIII. kongreso ni devis

prokrasti la publikigon de kelkaj jam kompostitaj artikoloj, interalie la finon de la artikolo »Praha«. Ili aperos en la venonta numero. Senpere antaŭ la kongreso ni eldonos kongresan numeron, kiu enhavos artikolojn pri Ĉeĥoslovakio, utilajn informojn pri la kongresurbo, ĝiaj vidindaĵoj kaj muzeoj, adresaron de fremdlandaj ambasadoroj kaj konsulejoj en Praha, kompletan programon de la kongreso kaj de la fakaj kunvenoj k. t. p. Niaj abonantoj ricevos tiun numeron senpage per la poŝto. Neabonantoj povos ĝin aĉeti en la kongresejo. Ĝi estos tre utila helpilo al ĉiu kongresano kaj bela memorajo je la XIII. Samideanoj, agitu por ĝia multenombra disvastigo kaj faru opajn mendojn ĉe nia administracio. Ĝi koston 3.— Kč, por opaj mendoj ni donas rabaton.

Kongresantoj el Moravio, Silezio kaj Slovakio atentu! Laŭ la decido de la Ministerio por fervojoj oni ekspedos el Košice (Slovakio) specialan vagonaron al la XIII. kongreso, kiu veturos tra Bohumín (Oderberg), Přerov kaj Třebová — se por tiu vagonaro estos sufiĉe multaj pasaĝeroj. Tial oni petas: Anoncu senprokraste vian adreson al la Esperantista Klubo en Vítkovice (M. Ostrava), aldonante respondkarton. Al ĉiu oni anoncos la daton de forveturo de tiu ĉi vagonaro el lia urbo! La XIII-anoj estas invitataj viziti la mondfamajn fabrikojn de Vítkovice kaj karbminejojn de Mor. Ostrava inter la ambaŭ partoj de ĉs. Silezio. Anoncu vian adreson al la Esp. klubo en Vítkovice, kiu zorgos pri loĝado kaj gvidado. Ĝi ankaŭ eldonos gvidlibron. — Aldonu respondkarton!

Postkongresa ekskurso al Bratislava.

La esperantistoj de Bratislava (Pressburg, Pozsony) invitas plej sincere la partoprenantojn de la XIII. kongreso viziti post ĝi ilian urbon, kiu estas ne sole tre rimarkinda pro multaj arkitekturaj belaĵoj, pitoreska ĉirkaŭaĵo, gravaj industriaj entreprenoj kaj rapide disvolviganta komerca haveno en Danubo, sed kie la granda signifo de la urbo, kiel grava komerca centro estos dum 6—16 aŭgusto dokumentata per la grandioza »Orienta foiro«, kiu la unuan fojon en la sistema aranĝo montros la produktaron, kiun la centra Eŭropo ofras al la proksima Oriento kaj kion tiu ĉi ofras al ni. La foiro kompreneble korespondas en Esp. kaj deĵoras en ĝi ĉiutage esperante parolanta funkciulo.

La subskribita societo aranĝas komunan karavanon de la kongresanoj, kiu forveturos el Praha la 6. aŭg. vespere, alvenos en Bratislava la sekvantam matenon, estos zorge akceptita, kaj ni ĉiuj klopodos, ke ĝiaj partoprenantoj forportu el nia urbo la plej belajn impresojn. Ni zorge plenumos ĉiujn petojn koncerne loĝado kaj esperas, ke almenaŭ ĉiuj partoprenantoj de la postkongreso en Budapeŝt vizitos nin. Nia urbo estas ankaŭ taŝga elirejo por viziti aliajn vidindajn lokojn de la pitoreska Slovakio.

»Esperanta Tablo-Girlando Posonium«

E. Wanitsch, prezid. J. Klopita, sekret.

Dr. St. Kamaryt, UEA. del.

Orientbohemiaj esperantistoj havos la 26. union en Hradec Král. sian sesan laborkun-

sidon. Samtempe estos tie aranĝata en Městské přím. museum regiona ekspozicio mir-granta (de la 18.—26. jun.) kaj la 26. jan. antaŭtagmeze okazos publika propaganda parolado de so. ing. Berger el Moravany. Detalan programon laŭdezire sendos al ĉiu interesanto la loka Esp. klubo. — En la intereso de nialanda esp. movado ni varme deziras, ke tiun konferencon partoprenu ĉiu samideano, kiu vo'as okupi sin per propaganda laboro, ĉar la konferencoj de niaj orientbohemiaj samideanoj ĉiam prezentigas kiel vera lernajo de poresperanta propagando. Mirinde senlacaĵ, per la tuta animo sindonaj al nia afero, insistemaj, oferemaj, persistemaj, ĉiam kaj al ĉiu bonkoraj, tio estas la ĉefaj trajtoj de niaj orientbohemiaj propagandistoj, al kiuj oni povas doni kvazaŭ honoran titolon: esperantistaj formikoj. Sen ĉiu ajn laŭda intenco por ili ni nur deklaras tion, kion jam delonge ni konstatis: la laboro de orientbohemiaj samideanoj povas servi kiel modelo por tuta nia enlanda propagando. Tial kiu povas, veturu la 26. jun. al Hradec Kráľ!

Membroj de la Ĉs. Ruĝa Kruco! Ĉiu el Vi skribu tuj, menciante la rezolucion de la X. Internacia konferenco, al la Loka societo de la Ruĝa Kruco kaj proponu ankoraŭ en tiu ĉi sezono organizi paroladon pri Esperanto kaj postuli enkondukon de Esp. en »Měsíčník dorostu Červ. Kříže! Esperantistoj-Ruĝkrucaj, faru tion hodiaŭ! Faru ĝin ĉiu! Laboru samtempe por la noblaj ideoj de la Ruĝa Kruco kaj de la esperantismo. Dr. St. Kamaryt.

El familio de La Progresanoj. So Bedřich Tittl, red. de »La Progreso« el Plzeň kaj fino. Olga Sládková el Škvrňany, anonas sian fianĉigon. — Nian eminentan saminon. finon. Julie Šupichová trafis la sorto tre dolore: la 7. de majo mortis ŝia bona kaj zorgema patro so. Otlo Šupich, ŝatata komercisto en Červený Kostelec. En ŝia granda doloro ni esprimas al ŝi la plej varmajn simpatiojn kaj sincerajn kondolencojn.

La redakcio.

Korekto. En la anoncon de la firmo Horowitz a spol. Liberec, kiu estis enpresita en la lasta numero de nia gazeto enŝoviĝis preseraro: En la lasta linio oni legu: por nia afero, anstataŭ: por mia afero.

MI PETAS.

ĉu oni trovos por blinda, tre fervora samideanino el Praha kiu pro malfavoraj familiaj cirkonstancoj neniam pasigis someron en kamparo, senpagan somerorestadejon por monato julio? Ŝi poviu triki kaj helpi en la hejmaj laboroj. Bonkoraj samideanoj el kamparo, helpu, mi Vin petas! Skribu al:

B. TITTL,
red. de la »Progreso«, Plzeň.

DEZIRAS KORESPONDI.

(Klarigo: kor. = korespondas, int. = interŝanĝas, L. = leteroj, I. K. = ilustritaj kartoj, P. M. = poŝtmarkoj, G. = gazetoj, S. M. = sigelmarmoj.)

Praha II. (Ĉeĥoslovakio), Koubkova 6. So. Boh. Vraný — kor. L., I. K., int. P. M.

Libeč 42, u Prahy, (Ĉeĥoslov.). So. Boh. Piskáček — kor. I. K., int. P. M. kun fremdlandanoj. Ĉiam resp.

Praha II. Zemské fin. ředitelství, (Ĉeĥosl.). So. Frank Šedivý, št. oficisto — kor. L., I. K., int. P. M.

Plzeň, (Ĉeĥosl.), Doudlevecká 38. So. J. Rich. Blank — kor. kun fremdlandaj studentoj kaj studentinoj-filatelistoj.

Dolní Lukavice u Přeštic, (Ĉeĥosl.). So. Jos. Bloch — kor. kun fremdl. gestudentoj-filatelistoj.

Zimkovy u Nepomuka. (Ĉeĥosl.). So. Jos. K. Kunderát — kor. kun fremdl. gestudentoj-filatelistoj.

Soběkur, pošto Merklín, (Ĉeĥosl.). So. Jos. L. Kropáček — kor. kun fremdl. gestudentoj-filatelistoj.

Liberec, (Ĉeĥosl.), Svahová 3. (Rollg.). So. Rud. David — kor. I. K. kun fremdlandanoj.

Strašice II. ĉt. u Rokycan (Ĉeĥosl.). So. Fr. Krofta — kor. kun tuta mondo. Resp. ĉiam.

Český Brod 149, (Ĉeĥosl.). So. Václ. Kácal, oficisto — kor. kun skoltaj, sportistoj kaj kolektantoj de la tuta mondo (escepte ĈSR.) per I. K., int. P. M., G., kaj fotoĉiĉojn.

Wallasey, (Anglio), 1 Joronto Street. So. Arthur Shaw — kor. per I. K. kaj L.

Val. Meziříčí, (Ĉeĥosl.), Vsetinská ul. 75. So. Francisko Vicena — kor. per L. kaj I. K. kaj int. P. M. Ĉiam resp.

Napajedla, (Ĉeĥosl.), Žerotínova 264. So. Jan Nesrsta — kor. I. K., int. P. M.

Brandýs n. Orlicí, (Ĉeĥosl.). So. Jan Myška — kor. I. K. kaj L. kun fremdlandanoj. Resp. ĉiam.

Barcelona, (Hispanio), Str. Orden. 36, 2a., (San Andrés). So. José Sáez — kor. per L., I. K. kaj int. P. M.

Barcelona, (Hispanio), Str. Martínez de la Rosa 69, 2, 1 a. So. Joaquín Darre — kor. per I. K., int. P. M. kun ĉiuj landoj.

Lisboa, (Portugalia), ruĝ. Heliodoro Salgado, c r s/c, So. Manuel Madeira — kor. pri esperantismo kaj laborista movado. Resp. ĉiam.

Simbirsko (Rusio), Str. de Leono Tolstoj 35., Mikaelo Kleverov — kor. per L. kaj I. K. pri vegetarismo, geografio, homara celado, kaj belajoj de la naturo.

BULGARAJ ESPERANTISTOJ, ATENTU!

Baldaŭ aperos:

PLENA LERNOLIBRO DE ESP.

por memlernantoj kaj kursoj, kun komentario, ekzerco, krestomatieto kaj frazeologio. Prezo 20 lv.

Jam aperis:

PLENA DUOBLE VORTARO DE ESP.

tre utila ankaŭ por aliaj slavoj kaj fremduloj lernantaj bulgaran lingvon.

Aprobata de la Ministerio de publika instruado. Prezo 30 lv. (por 2 ekz. 52 lv.)

Mendebla ĉe la aŭtoro: Ivan Krestanof, gimnazia profesoro en Karlovo. (Bulgario).

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — **Responda redaktoro:** B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. **Presis:** Laborista presejo, Plzeň.